# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 10 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 10

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

## Esperanto kaj la liberpensula movado

**Raporto de K-do prof. Hartvig dum la fakkunsido de la liberpensuloj**

En la ideologia transira procedo de la homaro, esperanto k liberpensismo devenas el diversaj lokoj, sed fine ambaŭ fluas en la grandan riveregon de la socialista movado. La ideo de mondhelplingvo, de kelka tempo devis akcepti konkretajn formojn, ĉar la ekonomiaj interrilatoj komencis forviŝi la naciajn limojn de la ŝtatoj. Ĝis tiam la lingvo de unuopa popolo havis mondvaloron, dum ĉi tiu popolo per disvastiĝo de sia mondkomerco akiris mondekonomian gravecon. Laŭ tia senco la angla, franca k germana lingvoj estis mondlingvoj. Sed ĉar unu popolo ne povis sin altrudi imperialisme, pro tio la lingvo de unuopa popolo ne povis iĝi la sola mondlingvo. La angla lingvo estis survoje iĝi la reganta mondlingvo.

Tiel konsiderata, la esp.-movado estas nur ekonomia kategorio. Pro motivo de ŝparo ĉiuj popoloj devus havi intereson propagandi komune mondlingvon por faciligi la mondekonomiajn interrilatojn inter ĉiuj landoj de la tero. Kiel oni tipigas en la fabrikado por gajni tempon k laboron ĉe ŝanĝado de partoj, tiel ankaŭ la lingvo estus tipigenda laŭ la konata principo de Vilhelm Ostwald: "Ne malŝparu energion". La ĝenerala akcepto de komuna mondlingvo sendube liberigus energiojn, kiuj povus esti uzataj de la homaro por pli grandaj taskoj, pri kio jam la biblio havis antaŭsenton, kiel pruvas la rakonto pri la turkonstruo de Babel.

Laŭ tio la esp.-movado estus nepolitika movado, interesanta samgrade ĉiujn homojn. Oni nur bezonus montri al la homoj la prudentaĵon, por ke ili agu racie. Por indulgi la nacian brilon, oni formulas la postulon: "Uzu la gepatran lingvon por la internaj interrilatoj kaj apliku esp-on por la tutmondaj interrilatoj". Per tio oni dekretas la neŭtralan karakteron de esp-o. Tio estus ĝusta, se ja ne ekzistus klasdiferencoj. Por la senklasa socio komuna estus komprenebleco. En klassocio esp-o signifas ne nur la raciigon de mondekonomiaj interrilatoj, sed ankaŭ danĝeron: la raciigon de la organizado de l' mondproletaro!

Por la reganta klaso signifas esp-o certe ŝparon, sed al ĉi tiu profito kontraŭstaras la granda malprofito, ke ankaŭ la antaŭenema klaso per helpo de la reciproka interkompreniĝo per esp-o povas pli perfektigi siajn internaciajn interrilatojn. Kun aliaj vortoj: la esp.-movado havas politikan signifon. Kiu ne atentas tion, estas utopiisto, t. e. li kredas per propagandado de racia ideo helpi al tiu ĝis venko. Estas evolua vidpunkto, kiu relative tiel longe valoras, kiel longe la reganta klaso havas la certon pri sia regado. Tiu vidpunkto estas sociologia, t. e. ĝi devenas el epoko de plej bona stato de la kapitalismo. En la tempo de la daŭra krizo de l' kapitalismo la evolua vidpunkto perdas sian signifon. Reakcio k revolucio kontraŭstariĝas malamike, k la reganta klaso estas devigata por konservo de siaj privilegioj altiri ĉiujn ideologiajn rezervojn. Ĉi tiu fakto efikas ankaŭ en la esp.-movado. Ekzistas burĝa, t. e. utopia koncepto en la esp.-movado, k proleta, t. e. revolucia koncepto. La organiza esprimo por ĉi tiu fakto estas la ekzisto de la grupoj: Universala Esperanto Asocio — Sennacieca Asocio Tutmonda.

Sammaniere oni povas konsideri la evoluon en la liberpensula movado. Ekzistas burĝa liberpensulmovado organizita en la Internacio (Bruselo) k forte kreskanta proleta liberpensul-movado, kies Internacion mi havas la honoron reprezenti ĉe via kongreso. En la liberpensul-movado oni povas pli bone observi la sociologian evoluon. Ankaŭ la burĝaj liberpensuloj estis iam revoluciemaj. La burĝa liberpensul-movado estis la kunapero de la burĝa revolucio. La antaŭenema burĝaro de tiu epoko, kiu batalis kontraŭ la privilegioj de la nobelaro, devis ankaŭ batali kontraŭ la kunliganon de la nobelaro, la tiaman feŭdan eklezion. En la centro de tiu ĉi batalo staris la tolerempenso. Libero de la konscio, tio estis la signaldiro de la burĝaj liberpensuloj, k ili ne tiom kontraŭbatalis la religion per si, ol antaŭ ĉio la obstinan dogman, konfesan devigon.

Tiuj burĝaj liberpensuloj el tiama epoko parte ne estis ateistoj, sed diistoj, t. e. ili ne neis la ekziston de dio, sed ili opiniis, ke dio estas tiom majesta super la homo, mistera, neesplorebla, ke estus blasfemo, se oni farus sin — kiel la eklezio — pri tiu dio pozitivan imagon. Tiuj burĝoj estis utopiistoj ĉar ili kredis, ke per nura klerig-laboro oni povus detrui la religian iluzion de la homoj k unu el iliaj tipaj reprezentantoj, Volter, faris la karakterizan eldiron: Dekdu homoj — li opiniis la apostolojn — fondis la kristanismon. Mi pruvos al vi, ke sufiĉos unu — li pensis pri si — por detrui ĝin. Li ne detruis ĝin, ĉar la religio havas siajn sociologiajn radikojn. La forigo ne estas afero de la racio, sed demando de la socia transformiĝo. La religio estas politikaĵo. Nur en senklasa socio la senreligieco estos kompreneblaĵo.

Sendube akcelas la ekonomia progreso, precipe la teknika disvolviĝo, forigon de la religiaj ideologioj. Per la progresanta regado super la naturfortoj la homo fariĝas sendependa de la naturpotencoj, kiuj minacas sian ekziston. Sed por vastaj partoj de la popolo dio estas ankoraŭ, se ankaŭ nur imaga, esenco. Tiel ekz. la agrikulturo ankoraŭ estas dependa de vento k vetero, t. e. de "ĉielaj potencoj" kiujn ni ne povas laŭdezire reguligi. Por la kamparano dio ne estas simpla kredafero, sed dio estas produktfaktoro, ĉar li estas tiu, kiu kiel nevidebla naturpotenco kreskigas la grenon. La klerigado ne sola sufiĉas. En privatekonomia epoko la ekzistdemando kiel sortdemando manifestiĝas per religiemo.

Aliflanke la religio havas por la reganta klaso grandan politikan signifon, ĉar la religio helpas konservi la ekspluatatajn amasojn aŭtoritat-kredemaj. La kontraŭreligia klerigo signifas pro tio politikan danĝeron. Kun la kredo je dio ankaŭ malaperas la respekto antaŭ la de dio volita sociordo. La sendieco iĝas batalilo en la proleta klasbatalo. La reganta klaso havas intereson akceli ĉe la amasoj la religian ideologion, por ke ili estu ekspluatiĝemaj. Tio estas la senco de la "konkordat"[1]-politiko. Siaflanke la antaŭenema klaso havas intereson venki la reakcie efikantan religian ideologion. La proleta liberpensul-movado estas kuna apero de la proleta revolucio. Sed la religio estas nur parto de tiu ideologio, kiu estas kapabla fortiri la proletaron de ĝiaj klasinteresoj. Ne ekzistas nur katolikaj sindikatoj, kiuj per siaj apartiĝoj malpliigas la batalforton de la liberaj sindikatoj, sed ekzistas ankaŭ naci-socialista movado, kiu multoble kontraŭstaras al la internacie orientata laboristaro. La naciismo havas nature ne nur psikologiajn radikojn sed ĝi estas ankaŭ ekonomie kondiĉita. Se en Usono la negroj ne estas akceptataj en la sindikatoj kaj pro tio ili estas devigataj fondi proprajn sindikatojn, tiel ne estas klarigita ĉi tiu fakto kiel rasmalamikeco, sed inverse, la rasmalamikeco estas natura sekvo de la konkurbatalo, kiun gvidas la usona laboristo kontraŭ la pli malpostulema negro, kiu estas salajr-malpliiganto.

La internacia pensado de la proletaro estas la antaŭkondiĉo por ĝia venko. Ne estas nura agitfrazo, se Karl Marks finas la Komunistan Manifeston per la vortoj: "Proletoj ĉiulandaj, unuiĝu!" La internacia kapitalismo nur povas esti forigata de la internacia proletaro. Ni scias kiel marksistoj, ke ankaŭ la edukado al internacia pensado ne estas simpla demando de klerigado. Ni scias, ke la angla laboristo, kiu ankoraŭ hodiaŭ vivas el la ekspluatiĝo de sia hinda frato, ankoraŭ ne povas pensi internacie kaj sentas sin minacata, perdi sian parton el la profito de la angla kapitalismo, per la liberiĝo de Hindio. Sed ni ankaŭ scias, ke per la daŭra industriigo de Hindio k la per tio kaŭzita pliigita senlaboreco en Anglio la angla laboristaro devas esti radikaligata kaj

[1] Kontrakto inter eklezio k monda potenco.